

Hæc hora, quæ resplenduit

Brevier-Himno

Paska tempo > meza horo > posttagmeze

*Hæc hora, quæ resplenduit
crucisque solvit nubila,
mundum tenebris exuens,
reddens serena lumina.*

*Hæc hora, qua resuscitans
Iesus sepulcris corpora,
prodire mortis libera
iussit refuso spiritu.*

*Novata sæcla credimus
mortis solutis legibus,
vitæ beatæ munera
cursum perennem currere.*

*Iesu, tibi sit gloria,
qui morte victa prænitens,
cum Patre et almo Spiritu,
in sempiterna sæcula.*

Amen.

Ĉi naŭa hor' per nova splend'
la nubojn prenas for de l' kruc',
la mond', libera de obskur',
rebrilas en serena lum'.

Diskrevas rokoj, tremas ter',
kaj tomboj apertigas sin.
Sanktuloj levas sin el mort',
aperas en la sankta urb'.

Ni kredas, ke la olda leg'
de l' morto ne validas plu.
Jen nova mond' per Dia don'
iranta al beata viv'.

Al Vi, Jesuo, estu glor',
post Via venko brilas Vi
kun Viaj Patro kaj Spirit',
tra ĉiuj tempo kaj eon'.

Amen.

latina T: anonima, 15-a/16-a jarcento

E: Albrecht Kronenberger 2008, dua strofo
parte originale verkita laŭ Mat 27,51-53